Bulteno de la **Londona Esperanto-Klubo** 2019 januaro-februaro

GRAVA ANONCO PRI JARKUNSIDO

La venonta jarkunsido de LEK okazos vendredon la 22-an de marto 2019 je 19.15 ĉe Diorama Arts Studios, 201 Drummond Street, NW1 3FE. Estos propono altigi la normalan kotizon al £15 (kaj la ceterajn kotizojn proporcie), pri kio klarigoj aperos en (aŭ kun) la venonta bulteno (marto-aprilo).

Kluba Programo:

januaro:

4 Neniu kunveno

11 Novjara Festo (Dioramo) 1900h

18 Lingva Vespero (Ibis Shoreditch)

25 Anna Lowenstein: *La komencantoj kaj ni* (Dioramo)
(1800h Konsilantaro)

februaro:

1 Literatura Vespero (IBIS Shoreditch)

8 Maurizio Giacometto: *Ĉu vi scias, ke … [10 aferoj kiujn vi ne scias pri … Italujo]* (1800h Konsilantaro)

15 Lingva Vespero (Ibis Shoreditch)

22 Komuna manĝo: Restoracio Chutney's Euston, 124 Drummond Street, ek de la 1915h.

*Anoncu vian ĉeeston al **Daniel Hayon** danielhayon@hotmail.co.uk antaŭ la 8-a de februaro.*

marto:

1 Lingva Vespero (Ibis Shoreditch)

22 Kluba Jarkunsido (vidu anoncon)

Esperanta Kalendaro:

12 – 16 aprilo 2019 Brita/Franca Esperanto-Kongreso, The Ark, Dover (detaloj sekvos) esperanto.org.uk
20 – 27 jul 2019: 104a Universala Kongreso de Esperanto – Lahtio, Finnlando http://uea.org/kongresoj

OKAZIS LASTATEMPE …

7 novembro: **PRELEGO PRI D-RO ZAMENHOF** en Juda Kultura Centro, Finchley Road. La evento estis organizita la 7-an de pasinta novembro de la Juda Kultura Centro kunlabore kun la Pola Kultura Centro en Hammersmith. Prelegis Agnieska Kajdanowska en la angla pri Ludwik Zamenhof, the creator of Esperanto. Ĉeestis Diana Robin kaj Marteno Miniĥ de la Londona Esperanto-Klubo, kiuj ankaŭ havis la eblecon rakonti pri siaj vojaĝoj al Bjalistoko kaj donaci esperantaĵojn al la ĉeestanta publiko.

Diana Robin

7, 8, 10, 20 novembro: **WESELE/ WEDDING**, spektaklo en la angla, la pola kaj Esperanto kaj prezento de JEB pri Esperanto. En la kadro de la teatra festivalo Voila Europe! okazis du eventoj, en kiuj Esperanto rolis.

La unua estis la teatraĵo Wesele/Wedding de Margot Przymierska, komencanta pola esperantistino el Londono. Ŝia spektaklo okazis la 7-an, 8-an kaj 20-an de pasinta novembro en Applecart Arts, 170 Harold Road, Upton, Londono E13 0SE (inter la stacioj Plaistow kaj Upton Park). En la spektaklo ŝi surscenigis internacian britan-polan geedziĝfeston, "la lastan antaŭ Briteliro"; oni povis kunkanti tradiciajn polajn geedziĝfestajn kantojn, sed ankaŭ pripensi pri la rolo de tradicioj kaj pri internacia komunumeco.

La dua evento estis io rekte pri Esperanto: sabate, la 10-an de novembro inter la 12:45 kaj la 13:45, okazis interaga lingvoleciono kaj rakont-seanco de Ariel Bonkorpa en la sama teatro. Laŭ Ariel, la publiko estis multenombra kaj kontenta pri la prezento.

Redaktis Renato Corsetti,
laŭ materialoj de Marteno Miniĥ aperintaj en la reto

23 novembro: ***PALESTINO STRANGOLATA / BRULVUNDE***, prezento ĉe LEK, fare de Jorge Camacho. La prezento de poemoj estis unu el la plej sukcesaj eventoj de la Londona Esperanto-Klubo en ĉi tiu jaro. Jorge legis siajn poemojn el la libroj *Palestino strangolata* kaj *Brulvunde*. Por iuj, kiuj volas pli profunde informiĝi pri li jen kelkaj linioj: Jorge Camacho (Hispanujo, 1966). Ĉefaj verkoj: eseo *La liturgio de l' foiro*; rakontoj en *Sur la linio* kaj *Ekstremoj*, prozaĵo *La ĉapo de la sterko-vermo*, satira novelo *La Majstro kaj Martinelli*; poemaroj *Celakantoj*, *Saturno*, *Eklipsas*, *Koploj kaj filandroj*, *La silika hakilo*, *En la profundo*, *Strangaj spikoj*, *Palestino strangolata* kaj *Brulvunde*. Tradukis *Letero el Palestino* de Santiago Alba, poemojn de Ángel González en *Astura bukedo*, novelojn kaj poemojn de Jorge Luis Borges en *La sekreta miraklo.* Lanĉis kaj kunredaktis de 2007 ĝis 2014 la literaturan revuon Beletra Almanako, al kiu li abunde kontribuis kaj plu kontribuas.

Raportis Renato Corsetti

Loko, horaro kaj aliaj informoj

Ni kunvenas vendredvespere, en iu el du lokoj:
Diorama Arts Studios, 201 Drummond Street, NW1 3FE (por kunveno kun programo);
Ibis London City – Shoreditch Hotel, 5 Commercial St, London E1 6BF (por diskutvespero)

Kutima programo ĉe Dioramo:
18:00 lingvokurso(j) kaj/aŭ konsilantarkunsido
19:15 – 20:15 prelego aŭ alia ĉefprogramero
20:15 – 20:45 paŭzo
20:45 – 22:00 forumo, diskuto aŭ daŭrigo de la ĉefprogramero
22:00 fino

Dioramo: Metrostacio: Warren St (linioj "Victoria", "Northern"), Euston Square ("Hammersmith & City", "Circle"), Regents Park ("Bakerloo").
Fervojo *London Overground*: Euston
Busoj: 10, 14, 18, 24, 27, 29, 30, 73, 88, 134, 205, 390, 453, C2.
Ibis (Shoreditch): Metrostacio: Aldgate East – uzu la eliron nro 2 (Toynbee Hall); (linioj "Hammersmith & City", "District"); Aldgate (linioj "Circle" "Metropolitan").
Busoj: 15, 25, 67, 115, 135, 205, 254.

Kotizoj: £10 jare; fora membro: £6 jare.
Kluba retejo:
http://www.esperanto.org.uk/lek/lek.htm

Lokaj grupoj: Orientlondono: Roy Simmons 01473-461346 rokeby@globalnet.co.uk; Sudlondono: Gregory Porilo 020-8672 8095 esperanto-sleg@tiscali.co.uk.
Federacioj: Orienta: Roy Simmons (vidu supre); Sudorienta: Kevin Murray, 11 Leybourne Ave, West Byfleet, Surrey KT14 7HB 01932-345779 yarrump@gmail.com.

Letero de nia Vicprezidanto

Karaj Klubanoj:

Bonvenon al la nova bulteno kaj mia unua vicprezidanta letero. Dum lastatempa konsilantar-kunsido ni decidis ke dum la venontaj kelkaj bultenoj ni enkonduku nin al la legantaro per verkado de bultenletero. Do, jen la mia.

Mi estas la vicprezidanto dum preskaŭ 18 monatoj, ek de la jarkunsido 2017. Kiel hobioj, mi ŝatas lingvojn, matematikon kaj tabulludojn, kaj kiel homoj kiu ankoraŭ laboras, faradi tiom multe signifas plenan kaj ampleksan vivon.

Dum la lastaj klubkunvenoj ni havis kelkajn interesajn prelegojn, unue pri la kimra lingvo, due pri prononcado de Esperanto, kaj plej lastatempe ni havis gaston (Hilary Chapman) kiu prezentis al ni esploron pri kial Esperanto sukcesis.

Dum frua vintro en antaŭaj jaroj la klubanaro foje manĝis en restoracio. Ĉi jare ni decidis fari tion pli malfrue en la klubjaro, post Kristnasko. Serĉu anoncon pri la dato aliloke en tiu ĉi bulteno.

Mi konstatas ke kelkaj el vi ne ofte vizitas (aŭ eĉ ne povas viziti entute) la klubon, do mi esperas ke almenaŭ iomete tiu ĉi letero helpas al vi senti vin ligita al la klubo kaj ekscii pri niaj kunvenoj kaj agadoj.

Amike,
via vicprezidanto
Matt Peperell





Funkciuloj: Honora Prezidanto: Prof. John Wells; Honoraj Vicprezidantoj: Heleno Fantom, Joyce Bunting.
Konsilantaro: David Thornell (Prezidanto kaj Sekretario), Matt Peperell (Vicprezidanto), John Wells (Vicprezidanto), Arturo Prent (Kasisto), Anica Page (Registristo), Renato Corsetti, Roland England, Chris Lewis, Terry Page, Antony Rawlinson (Bultenisto).
Adresoj: David Thornell: lek.sekretario@gmail.com; Arturo Prent: 7 Walton Garden, Hutton, Brentwood CM13 1EJ ap_esp-lek21@yahoo.co.uk, Terry kaj Anica Page:7 Hampton, Gt Holm, Milton Keynes MK8 9EP terry_page@btinternet.com, anica_page@btinternet.com, Antony Rawlinson: 5 Thorpe Crescent E17 5BY acj.rawlinson@ntlworld.com.